

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2020

Jarkolekto 7 - Numero 3



Medalego de la juna Ludoviko en la franca urbo Chambéry-le-Haut

ENHAVOTABELO

de julio 2020

Titolpaĝo: <i>Medalego en la franca urbo Chambéry-le-Haut</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Zamenhof-plaketo el Florenco</i>	
<i>Omaĝe al d-ro Paul T.C. Kempeneers</i>	
<i>Memore pri Augusts Kažoks (1881-1937)</i>	
<i>Du memormedaloj el Kabindo (2017)</i>	
<i>17a Hispana Kongreso de Esperanto, Barcelono</i>	
Esperantaj valormarkoj	13
Historiaj aspektoj: Pioniroj de la esperanta numismatiko	14
Spikumajoj & suplementoj: Broŝureto de la Ĉekbanko Esperantista ...	17
Por spuremuloj!	19
Aspektoj de numismatiko: Plumbaj sigeloj kaj aliaj sigeliloj (3)	20
Medalistoj: 22 Mario Nelli (1878-1936).....	23
Terminaro: alfabeto listo (22)	24
Numismatika Forumo: Konserviteco de moneroj	25
El la gazetaro:	27
Retpoŝto	28
Anoncoj & eventoj	35

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts

Kontakto: bert.boon@skynet.be

Provlegado: Jozefo Horvath

Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!

www.esperanto.es/biblioteko

Finredaktoro: Bert Boon

www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Karaj legantoj, la redakcio de ENA tutkore esperas, ke la viruso de la pandemio ne sukcesis kaj sukcesos malsanigi vin kaj viajn gekarulojn.

Evidentas, ke la tutmonda katastrofo malordigadas ankaŭ la socian vivon, al kiu ankaŭ kontribuas la internaciaj rilatoj, ĉefe tiuj de esperantistoj. Pro la krizo, la UK 2020, preparata en Montrealo, jam estas prokrastita al 2022, do la celita UK-medalo aperos nur post du jaroj, kompreneble kun alia jarindiko.

Bona novaĵo estas, ke nia Walter Klag el Vieno jam eldonis la duan, brilan medalon en arĝento en la serio “Pioniroj de la Esperanta Numismatiko”, pri kiu kaj kio ni raportas en ĉi tiu numero.

Pri la jubilea medalo, anoncata en la retejo de la Esperanta Civito, por honori la altnivelan revuon “Literatura Foiro”, ni ne plu ricevis novaĵon...

Ne decas, laŭ ni, dum pandemia krizo sendi varbcelajn mesaĝojn al gesamideanoj kiuj jes aŭ ne estas/estis trafitaj per la veruso, do la redakcio decidis provizore ne plu aktive varbi por ENA. Tamen, neatendite ni povis bonvenigi nian 141an membron, kiu loĝas en Brazilo.

Laste sed ne balaste, ni volas paroli pri la Movada Foiro. Ĝi estas kutima evento okaze de ĉiu Universala Kongreso, kiu donas al asocioj kaj fakgrupoj la okazon prezenti sin al la partoprenantoj de la UK. Ĉi-jare okazos, malgraŭ aŭ kaŭze de la prokrasto la unua virtuala Movada Foiro.

Por tiel prezenti sin, ELF-Arek, la asocio de esperantistaj filatelistoj kaj nia ENA konsentis kune prepari programon, ĉefe per komentataj filmetoj, por perekrane prezenti sin al ĉiuj interesuloj, kiuj eĉ rajtas sendi demandojn. Tial jam ekaktivis Elda Doerfler el Italio, la prezidantino de ELF-Arek kaj James Rezende Piton el Brazilo, la retejestro de ambaŭ asocioj en kunlaboro kun Bert el Belgio por ENA, per virtualaj kunvenoj pere de la komputila programo “ZOOM”.

Mi fieras povi fini per ĉi tiu mesaĝo: “La pandemio estas tre serioza problemo, sed ĝi povos cediĝi nek la filatelistan, nek la numismatan agadon!”

Bert



Elda



James



Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D 1 - Unuflankaj medaloj

Zamenhof-plaketo el Florenco



Lando: Italio

Metalo: kupro

Mezuroj: 5 mm x 3,3 mm

Jaro: *serĉata*

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 29,84 g

Medalisto: prof. Mario Nelli

Diko: 2 mm


Averso:

unuflanka medalo

meze: busto ene de medalioneto, dekstren

supre: ZAMENHOF NASK
 IS
 DEC
 1859

supre, maldekstre (vertikale): “M NELLI E C FIRENZE”



sube, maldekstre: laŭrobranĉeto

sube: “GLORA LA CELO
SANKTA L'AFERO”

Rimarko 1:

sur aliaj, italaj medaloj de la sama firmao inter NELLI kaj FIRENZE troviĝas ne “EC”, sed “INC”.



Rimarko 2:

La versaĵo venas el poemo de Zamenhof “Al la fratoj”, unue publikigita en 1889, en la revuo “La Esperantisto”.

Jen la strofo:

*Gloro la celo, sankta l'afero
la venko – baldaŭ ĝi venos;
levos la kapon ni kun fiero,
la mondo ĝoje nin benos.*

La redakcio kore dankas **Eldan Doerfler** pro la informoj!

Paul T.C. Kempeneers: erudito, esperantisto kaj mondcivitano

Doktoro Paŭlo Kempeneers naskiĝis la 9an de decembro 1935 en Tienen [tinen], provinca urbo en Belgio.

Kiel gimnaziano li ĝuis klasikan edukadon surbaze de la latina kaj de la greka lingvoj. En 1953 li enskribiĝis en la antverpena navigacia lernejo kaj en la sama jaro, kiel ŝipano, li vojaĝis al Okcidentafriko, ĝis Dakaro, sur la famega veltrejnŝipo “Mercator”. En 1956 li instruistiĝis pri literaturaj fakoj en la altlernejo de sia naskiĝurbo, kien li post 18 monatoj returniĝis, plenuminte sian militservon en la mararmeo. En 1970 li iĝis urba bibliotekisto kaj daŭrigis studadi en la Biblioteka Instituto de Bruselo. Sekve li ekstudis en la universitato de Loveno kaj iĝis magistro - filologo pri ĝermanaj lingvoj. En 1982 li doktoriĝis kaj ĉesis instrui, por direktoriĝi en “Nobel”, la sekcio pri Adulta Edukado en Tienen.



Kiel instruisto li plej ofte verkis didaktikajn tekstojn, ĉefe pri la ĝusta uzado de la nederlanda kulturlingvo. Poste sekvis multaj eseoj pri la historio kaj la toponomio de la municipo Tienen kaj de la najbaraj municipoj. Fine, la 15an de decembro 2018, la tienena konsilio pri kulturo aljuĝis al li premion pro liaj dumvivaj esplorado kaj publikaĵoj.

Kiel esperantisto li ne nur verkis Esperanto-kurson kaj nederlandlingvan gramatikon, sed en lokaj gazetoj kaj aliaj revuoj li ofte verkis artikolojn pri Esperanto. En 1986-1987 (!) li anoncis bazan kurson de Esperanto en la sekcio Adulta Edukado. Preskaŭ 20 adultoj enskribiĝis. Du el ili en 1992 fondis la trian lokan Esperanto-grupon en la historio de la urbo. La asocio “La Hirundo” dum preskaŭ 25 jaroj ege aktivis, instruante, eldonante, organizante enlandajn kaj eksterlandajn eventojn kaj informante en kunlaboro kun la urba estraro. Kempeneers dum du lernojaroj eĉ sukcesis organizi en kunlaboro kun “La Hirundo” la unuan oficialan Esperanto-kurson en la sekcio por adultoj.



Paul Kempeneers eĉ sukcesis la nomŝanĝon de unu kilometron tereno, kies kandidat-aĉetantoj laŭ ili ĝi ne estas sufiĉe “Esperanto-laan”, kaj la propono do, ke la loka Esperanto-asocio, sukcesis persvadi Paul Kempeneers iĝi dumviva *honora membro* de “La Hirundo”, la dankema ido de sia projekto el 1986-1987.



akceptigi de la komunuma registaro longa aleo (laan) en nova industria ne ŝatis la provizoran nomon, ĉar internacia. Do, Paul proponis estis oficiale akceptita! Ne mirinde sed nur post senĉesa insisto, fine

sed nur post senĉesa insisto, fine

Bert

Tipo B 1 - Neesperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Omaĝe al d-ro Paul T.C. Kempeneers



Lando: Belgio
Metalo: novargento
Diametro: 30 mm
Jaro: 2000



Kvanto: 500
Pezo: 12 g
Medalisto: Luc Luycx
Diko: 2 mm

Averso:

dekstre: busto de Paul Kempeneers maldekstren
inicialoj de la medalisto L.L.
maldekstre: "Dr. PAUL KEMPENEERS"


Reverso:

supre: Numismatica Tienen - EGMP - 11 - 11 - 2000


meze: Hulde aan
Paul Kempeneers,
Plaatsnaamdeskundige en
doctor in de Germaanse filologie,
ter gelegenheid van zijn
65ste verjaardag.
Tienen, 9-12-2000

Omaĝo al
Paul Kempeneers,
toponimiisto kaj
doktoro de la ĝermana filologio,
okaze de lia
65a naskiĝdatreveno.
Tienen, 9-12-2000

flanke: du signoj >



ĉefanĝelo Mikaelo (signo de la ŝtata monerfarejo en Bruselo)



pesilo (monfarejstra signo de s-ro Romain Coenen)

Rimarko 1:

Numismatica Tienen: ĝenerala, belga numismatika asocio, kiu subtenas la esperantan numismatikon, i.a. per artikoloj kaj la organizo de prelegoj.

Rimarko 2:

E(uropees) **G**(enootschap) (voor) **M**(unt- en) **P**enningkunde = Eŭropa Akademio por Numismatiko.

Rimarko 3:




La medalisto Luc Luycx ĉeestis en la jaro 2000 dum la ĉiujara internacia kunveno kaj foiro de internaciaj numismatoj, organizata de Numismatica Tienen.

Luc Luycx, fama kiel “la patro” de la eŭro-moneroj

Rimarko 4:

Jen la skizoj de Luc Luycx



Rimarko 5:



foto: Marcel Massart

La tiama estraro de Numismatica Tienen kaj Paul Kempeneers kun la medalo, L.Luycx kun la skizoj.

Fontoj: Jarlibro 2000 de la EGMP (p.71) / Muntklapper jan. 2001 (p.15)

La redakcio kore dankas sinjoron Pierre Degel, estraranon de NT, pro la senditaj informoj.

Tipo A 1 - Esperantaj medaloj

Memore pri Augusts Kažoks (1881 – 1937)



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 74 mm

Jaro: 1989

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 131,80 g

Medalisto: Jānis Strupulis

Diko: 4 mm

Averso:

meze: busto de Augusts Kažoks

supre: "AUGUSTS KAŽOKS"

sube: 1881-1937

Reverso:

meze: ONDO DE DAŪGAVA

supre: LA DUA ESPERANTO-REVUO EN LATVIO

sube: 1925-1935

Rimarko 1:

li estis la fondinto kaj la redaktoro de la dua latvia Esperanto-revuo; esperantisto ekde 1918, eminenta poemtradukisto kaj profesie telegrafa inspektisto.

Rimarko 2:

Daŭgava: la nomo devenas de la rivero Daŭgavo, kiu trafluas la ĉefurbon Rigo.

Tipo C 3 – Fantazia Esperanto-mono

Du “memormedaljoj” el Kabindo (2017)

A Centjara datreveno de la forpaso de
Zamenhof (1917-2017)



Lando: Kabindo
(Angolo)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: aluminio

Pezo: 2,85 g

Diametro: 30,20 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 2017

Diko: 1,5 mm

Averso:

meze: busto de Zamenhof, kapo maldekstren, malbrila, sed brila (polurita) fono

super la kapo: “DOKTORO ESPERANTO”

rande, meze: zinkita steleto; en ĝi pli malgranda steleto plialtigita

rande, supre: “1917 L.L.ZAMENHOF 2017”

sube: R\$500.000.000

Reverso:

meze: blazonŝildo de la banko de Kabindo kun literoj B C

supre: “BANCO DE CABINDA”

sube: “LIBERDADE” (libereco)

B Cent-tridek-jara datreveno de la naskiĝo
de Esperanto (1887-2017)



Lando: Kabindo
(Angolo)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: latuno

Pezo: 4,40 g

Diametro: 22,2 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 2017

Diko: 1,5 mm

Averso:

meze: kvinpinta steleto kun ene la litero **E**

supre: R\$2.500.000.000

sube: super la bazaj pintoj de la steleto kvazaŭ manskribita subskribo

L. Zamenhof

Tute sube:

**ESPERANTO
LINGVO INTERNACIA**

Reverso:

kiel la reverso de la medaleto A

Rimarko 1:


ambaŭ memoraĵoj apartenas al la numismatika sekcio de *eksonumioj* (= fantaziaj eldonoj de pseŭdomono).

Rimarko 2:

R\$ = realo. Portugala monunuo (ĉirkaŭ 1430-1911). Anstataŭigita de eskudo (ĝis 2002) kaj de eŭro poste. Ambaŭ valoroj sur la medaloj estas fantaziaj.

Rimarko 3:

Ambaŭ ĉi memormedaletoj estas unuavice politikaj propagandiloj. En 1975, post multjara armita batalado de diversaj ribelulaj movadetoj kontraŭ la koloniado, Angolo iĝis sendependa de Portugalio. Nur la liberiga organizeto el la provinco Kabindo (Cabinda) restis tiam flanke, ĉar ĝia propra celo senĉesa estas apartigo de Angolo. La provinco estas tial t.n. eksterklavo, situata inter la Atlantika Oceano, Kongo kaj DR Kongo (antaŭe Zairo). La rifuzo de Angolo agnoski la sendependencon de Kabindo estas ĉefe kaŭzita de la fakto, ke la provinco posedas multajn naftofontojn.



Tre verŝajne la medaletoj estas disvastigataj de la “Banco de Cabinda” sub la preteksto memoriĝi pri esperantaj eventoj. Ĝi klare montras revolucionan mesaĝon, nome la portugala vorto “liberdade” (= libereco, sendependeco).

La rilato kun Esperantujo restas provizore malklara, malgraŭ kelkaj indikoj kaj onidiroj kiujn ni esploris per korespondado. Nek iu persono el Lisbono, nek esperanta organizo en respondaj retmesaĝoj konfirmis iun ajn engaĝitecon, tute male. Tamen, Jozefo Horvath mencias, ke “La Esperanta Civito flegas kontaktojn kun Kabindo. D-ro Joël Batila, kanceliero de la Kabinda Respubliko estas senatano de la Esperanta Civito.

(Vd. ankaŭ https://groups.google.com/forum/#!topic/etnismo/IDqD8-i_LBg)”

Tipo E 1 – Prainsignaj medaloj

17a Hispana Kongreso de Esperanto, Barcelono



Lando: Hispanio (Katalunio)

Kvanto: *nekonata*

Metalo: latuno

Pezo: 5,05 g

Jaro: 1956

Medalisto: *nekonata*

Diametro: 31 mm (stelo)
26 mm (ringo)

Diko: 2 mm

Averso:

unuflanka medaleta

verda stelo parte sur blanka ringo (3 mm larĝa) kun oritaj randoj

sur la stelo: meze: kronita blazono de la urbo Barcelono

sube: orkolora banderoleta kun la nomo "BARCELONO"

en la ringo: "XVIIa HISPANA KONGRESO ESPERANTO 1956"

Rimarko 1:

jen la oficiala barcelona urba blazono (ekde 1329)



Rimarko 2:


“prainsigna”: kreiva kompromiso inter burĝaj kaj militistaj ordenoj unuflanke, kaj surhaveblaj aŭ surpendigeblaj medaloj aliflanke, estigis antaŭ nelonge niajn modernajn insignojn kaj butonojn

Rimarko 3:

en jk.5, n-ro 2, p. 5 ĝis 13 estas priskribitaj kvin aliaj Tipo E 1 - medaloj pri hispanaj naciaj kongresoj

ESPERANTAJ VALORMARKOJ

Kotizaj kvitancmarkoj



- "Kvitanc-marko": malsimilaj kvitancmarkoj de 1940 kaj de 1941, uzitaj kiel pagkonfirmiloj por la membrotizo de la Hungara Esperanto-Asocio de tiuj jaroj.

- "MESz" = Magyar Eszperantó Szövetség = Hungara Esperanto-Asocio.

- "tagdij" = membrotizo.

En tiuj jaroj probable la kotizo estis pagata en hungara "forinto". Nuntempe la kurzo estus 35 HUF/EUR, en 2019 ankoraŭ 315 HUF/EUR. Do, proksimume ses eŭrojn.

Forinto: en 1940-41 la hungara valuto estis *pengő* (pengo), kiu estas propre mallongigo de *tintanta (pengő) forinto*, do metala forinto. Tamen pengo kaj forinto diferencendas. Forinto (el la itala fiorino) estas refoje valuto ekde 1947. Unue forinto estis pagilo de 1325. (*kompletiganta informo de Jozefo Horvath*)

Ni dankas nian membron Marc Vanden Bempt pro la elhungarigo kaj pro la klarigoj lin kaj Jozefon Horvath.

Julia Isbrücker, la “frontlinia virino”

Julia Isbrücker, nederlandano, 1887-
grafologia atesto – “frontlinia virino”. Ŝi
Kongreson en Hago en Nederlando en
la eldonon de la unuaj stelo-moneroj,
steloj. Plastaj steloj, pregitaj en 2012,
aktuale uziĝas dum junularaj
100-stela arĝenta monero - pli ekzakte
honoro de René de Saussure, kaj en 2020
la honoro de Julia Isbrücker kaj samtempe
Kongreso.




1971, estis pioniro de Esperanto kaj – laŭ
kunorganizis la 12an Universalan
1920, la fondon de Universala Ligo kaj
kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25
kun nominaloj 1, 3 kaj 10 steloj,
Esperanto-kongresoj. En 2018 aperis
ĵetono aŭ speciala monero - por la
pregiĝis arĝenta 50-stela “monero” por
okaze de la 100a datreveno de la Haga

La 12a Universala Kongreso en Hago - 8a ĝis 14a de aŭgusto 1920 - estis ne granda. Aliĝis nur 408 personoj el 24 landoj, multaj el Britio kaj Nederlando. Tamen tiu kongreso estas grava, ĉar ĝi estis la unua post la Unua Mondmilito (1914-1918) kaj montras, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi Esperanton kiel vivantan lingvon. En Vikipedio troviĝas malklara nigra-blanka foto, kiu montras partoprenantojn de la ekskurso al Leiden. Pliaj informoj troviĝas en la libro „Sed homoj kun homoj” de Ziko Marcus Sikosek, aĉetebla per la libroservo de UEA.

En 1930 András Cseh (Andreo Ĉe) kun Julia kaj Johannes Isbrücker fondis en Arnhem la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto, kiu en 1933 translokiĝis al propra domo en Hago, kie ĝi hejmas ankoraŭ hodiaŭ. Ekde 1952 la Instituto portas la nomon Internacia Esperanto-Instituto.

La 14-an de aprilo 1942, ankoraŭ dum la Dua Mondmilito (1939-1945), nederlandaj esperantistoj sekrete kunvenis en privata domo en Hago por omaĝi la iniciatinton de Esperanto. Ili fondis Universalan Ligon (UL) por la idealisma celo unuigi la homaron, interalie per internacia lingvo. La 1an de julio 1945 la Prepara Komitato publikigis alvokon al la tutmonda esperantistaro aliĝi al la Universala Ligo kaj subteni ĝin. Pliaj iniciatoj estis la ĉiumonata aperigo de la gazeto “La Praktiko” kaj – laŭ la modelo de spesmilo – estigo de tutmonda monsystemo “stelo”. Pliaj detaloj troviĝas en jenaj vikipediaj artikoloj.



Walter Klag, Vieno

Bibliografio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Ligo

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Stelo_\(monunuo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Stelo_(monunuo))

Kelkaj jarkolektoj de „La Praktiko“ estas rete legeblaj:

<http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e6q&datum=1932&size=45>

E. Borsboom: "Vivo de Andreo Cseh", Internacia Esperanto Instituto, Hago – Nederlando 2003

HISTORIAJ ASPEKTOJ

PIONIROJ DE LA ESPERANTA NUMISMATIKO

B. Julia Isbrücker (1887-1971)

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj



Lando: Aŭstrio

Kvanto: 300

Metalo: arĝento (925/ 1000) polurigita

Pezo: 30 g

Diametro: 40 mm


Medalisto: H. Andexlinger

Jaro: 2020

Diko: 2 mm

Averso (nominalflanko):

meze: 50 STELOJ 2020 + arĝentostampo



supre: 100 JAROJ 12-A UNIVERSALA KONGRESO

sube interne: 30 GRAMOJ DA ARGENTO 925

ekstere: (symbol) DEN HAAG 1920 (symbol) (= jubilea simbolo 1987)

ĉirkaŭe: perlorando

Reverso (portretflanko):

meze: portreto de Julia Isbrücker kun la inicialoj A(ndexlinger) H(elmut).

supre: "JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO"

sube: ★ KLAG ★ 1887 – 1971 ★ WIEN ★

ĉirkaŭe: perlorando

Rimarko 1:



Desegnaĵo farita de Helmut Andexlinger laŭ foto de Julia Isbrücker.

Rimarko 2:

Mag. Helmut Andexlinger kreis ne nur ĉi tiun medalon monersimilan, sed ankaŭ la antaŭan, tiun de 100 steloj el 2018. Li estas la ĉefdezajnisto de “Münze Österreich”, kiu estas 100%a filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko. La surskribojn kreis la iniciatinto de la projekto, mag. Walter Klag el Vieno (Wien). La tuta finarango estas de mag. Helmut Andexlinger.

Rimarko 3:

Produktis la pagmedalon la pregejo Münze Österreich en Vieno. La surfaco estas PP (“proof like”), sen patino, pregita en ringo.

Rimarko 4:

1887 – 1971 estas la vivdatoj de Julia Isbrücker. Ĉi tiu jaro estas konsiderata kiel „Julia Isbrücker-Jaro“. 2020 rememorigas la 100an datrevenon de la 12a Universala Kongreso en Hago.

Rimarko 5:

La 100-stelan medalon ĉi tiu revuo montris kaj priskribis en jarkolekto 5, nr-o 1, p. 17-18.


Rimarko 6:

En la rubriko “Medalistoj” de jarkolekto 5, n-ro 1, p. 16 ni verkis artikolon pri mag. Helmut Andexlinger kaj mag. Walter Klag.

*La redakcio kore dankas **Walter Klag** pro la artikolo pri J. Isbrücker kaj ceteraj informoj!*

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Broŝureto de la Ĉekbanko Esperantista (1908 - 1918)



Ĉi tiu broŝureto estis informilo pri la de Herbert F. Höveler en Londono fondita ĉekbanko, kiu estis aktiva de 1907 ĝis la morto de Höveler en 1917. La parto de la teksto sub la purpura stampo de la Agencia Esperantista en Lisbono estas la jena: “ĈEBANKO ESPERANTISTA, MERTON ABBEY, LONDON. S. W., estas la sola banko en la mondo, kies kontuloj, detruinte la barojn de la diversmoneco, povas internacie pagi kaj interŝanĝi sumon...”

Ĉi-sube jen la oficiala anonco de la fondo:


Ĉekbanko Esperantista.

Por ekprovi la praktikecon kaj praktikeblon de ĉekoj esperantistaj antaŭ ol definitive decidi pri la aranĝo de banko esperantista kaj ĝia funkciado nia fervora samideano Ĉefeĉ starigis en septembro 1908 provizore regularon kaj malfermis kelkajn kontojn. Post kvinmonata ekprovada tempo, la esperantista ĉekbanko kaj ĝia funkciado estas nun **definitive** privedicita kaj praktikeble aranĝita. La nova regularo ĵus aperis. La ĉekbanko celas unue la faciligon de la pagoj inter la diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj, kaj due, prepari la vojon por la ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunujo. Por ke la banko utilu al la esperantistaro estas necese, ke oni povu pagi per ĉeko eĉ la plej malgrandajn sumojn, kiel ekzemple la abonon de iu gazeto, la koston de instruiloj, propagandiloj, k. t. p., kaj ke la ĉefaj librovendistoj, eldonistoj, asocioj, k. t. p. akceptu la esperantistajn ĉekojn en pago por siaj kalkuloj. La ĉekbanko esperantista baldaŭ publikigos la nomaron de la kontohavantoj, firmoj kaj privatuloj, kiuj akceptas esperantistajn ĉekojn. Kiu havas intereson por tiaj ĉekoj, skribu al: „Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London, S. W.“

La purpura stampo: “Agencia Esperantista Saldanha Carreira Apartado n° 104 Lisboa”



La Agencia Esperantista en Lisbono estis i.a. eldonejo, ekzemple de verkoj de Jorge Anibal de Saldanha Carreira (1887-1970). Li estis portugala esperantisto, bankoficisto kaj ĵurnalisto, kiu esperantistiĝis en 1913.



Jorge estis la unua portugala oficiro al kiu estis permesata oficiale uzi esperantan distingilon sur maniko. Dum la unua milito, en la tranĉeoj de Fauquissart, li nomis Zamenhof-Esperanto-avenuo la koridoron paralelan al la unua tranĉeo.

Li kunfondis la Portugalan Esperanto-Asocion, kies prezidanto li estis. Dum multaj jaroj li estis la unua pioniro kaj la personigo de Esperanto en sia lando. Li lernis la lingvon en 1913 kaj ekde tiam li penis pasie disvastigi ĝin, eĉ en la armeo. Krome li gvidis dialogan kurson kaj prezentis serion de paroladetoj pri la internacia lingvo ĉe Radio Stacio CT-IAA-Lisbono.

Li ankaŭ estis ĉefdeligito de UEA de 1932 ĝis 1949, ekde 1930 membro de la Lingva Komitato kaj kunaŭtoro de “Curso Elementar de Esperanto”. Li ankaŭ estis unu el la ĉefkunlaborintoj de “Enciklopedio de Esperanto” (1933-1934). En 1951 la Komitato de UEA decidis nomi lin Honora Membro de la Asocio.

Li postlasis al la Biblioteko de UEA ĉiujn esperantajn verkojn de sia tre riĉa persona biblioteko “honore al d-ro Edmont Privat”.

Fontoj:- Hans Jankowski: “Esperanto-mono” p. 8
- “Enciklopedio de Esperanto” p. 78
- Vikipedio

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.

16a enigmo

Esperanto - ĵetono



Pezo: 9.24 g

Diametro: 29 mm

La spesmila monsystemo estis aktiva de 1907 ĝis 1918. En 1927 Dreves Uitterdijk kaj J. Hengel fondis bankon, kies nomo estis “Universala Spesmila Banko”, por revivigi la sistemon. Ĉi tiu ĵetono kun valoro “unu speso” el 1984 do estas iu hazarda eldono. La historio de la ĵetono por ENA provizore estas enigmo...!

17a enigmo

Ĉu pregprovaĵo?



Diametro: 50 mm

Diko: 1 mm

Priskribo: ronda plateto kun stelo kaj radioj. Estas neniu indiko pri Esperanto, sed ĉar ĝi troviĝas en esperanta kolekto, supozeble estas rezulto de provo por esperanta medalo.

Ĉu vi, kara legant(in)o konas la solvon de la enigmo?

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Plumbaj sigeloj kaj aliaj sigeliloj (3)

Verkis: Raf Van Laere


Tradukis Bert

D) Malpli oftaj tipoj kaj objektoj kun la sama funkcio kiel sigeloj

Kojnoj kaj markoringoj origine estis oficialaj markoj. Ili konfirmis, ke la enhavo de kruĉo, poto, barelo ktp. estas konforma al la oficialaj devigoj. En kruĉojn estis borata trueto je ŝultra nivelo en kiu estis verŝata plumbo en kiun la urba blazono aŭ la volumena mezuro estis stampataj. Tiaj kojnoj estis aplikataj en la Nederandoj ekde la 15a jarcento kaj en la t.n. Sankta Romkatolika Regno de la Germana Nacio kaj ili estis uzataj ĝis la fino de la 19a jarcento.



Ege afinaj al kojnoj estas markoringoj, kiuj estis metataj ĉirkaŭ la kolon de boteloj aŭ la tenilon de kruĉoj. Ili konsistas el ringo kun "ligtubo" en kiun urba blazono estas enpresata. Tiuj markoringoj ŝajnas pli freŝdataj ol la kojnoj kaj ili estis pli ofte uzataj dum la 18a jarcento. Konataj estas ringoj ĉirkaŭ la kolo de vinboteloj el Meĥelno kaj Mastriĥto. Sufiĉe ofte estas trovataj diskoj kun ringetoj.



Ambaŭflanke ili surhavas bildon aŭ monogramon. Se la ringeto malaperis, ili aspektas kiel medaletoj. Tial ili ofte ne estas rekonataj kaj sekve foje malkorekte identigataj. Pli ofte temas pri devenomarkoj originale ligitaj al ferdrato el Nord-Germanio aŭ Skandinavio. Ĉar tiaj “malsuprenpendaj” sigeloj (*france: sceau à bélière; angle: looped seal*) estas facile dekroĉeblaj kaj reuzeblaj; ili probable neniam havis oficialan funkcion, sed estis nur devenomarkoj por informi eventualajn klientojn. En minimume unu kazo – Willem Momma, membro de familia entrepreno pri metalurgio el la valo de Mozo, kiu emigris al Aachen (Aĥeno, Germanio) kaj sekve al Skandinavio – ringeto ne estis regulata, do eblus konsideri ĝin kiel fruan reklammedalon.

Kapsuloj por boteloj kaj por skatoloj estis samcelaj kiel malsuprenpendaj ringoj uzataj por la sigelado de ferdrato. La plej ofte retrovataj ekzempleroj devenas de ujoj kun venecia teriako, patentigita resanigilo, kiu laŭdire taŭgus kontraŭ ĉiuj malsanoj. La kompleksa enhavo diferencis laŭ regiono kaj laŭ apoteko. Dum la 17a kaj 18a jarcentoj la veneciaĵo, konsiderata kiel la plej taŭga, estis internacie disvendata. Por garanti la kvaliton kaj malhelpi falsistojn, la ujetoj kaj boteloj estis provizataj per kovriloj kun la sigelo de la apotekisto. Tiaj plumbaj kovriloj same estis aplikataj por laksigiloj kaj minerala akvo.



E) Epilogo

Kiam estas parolata pri plumbaj sigeloj aŭ plumba sigelado, oni ofte aŭdas la neĝustan terminon “drapoplumbo” (*france: plomb de draperie; angle: cloth seal; germane: Textilplombe*). Malprave stariĝas la konkludo, ke plumbaj sigeloj pasintec estis nur aplikataj nur kiel kvalitmarkoj por tekstilaĵoj, kaj principe por lanaj tekstilproduktoj. Tiaj sigeloj tamen estis uzataj ankaŭ por aliaj varoj kiel fiŝretoj, ferdratoj ... do ne ĉiam por altkvalitaj varoj.


Ilia funkcio en la daŭro de la tempo ofte ŝanĝiĝis kaj dependis de la loko, kie ili estis aplikataj. En la Nederlandoj dum la Mezepoko la urba registaro havigis al si la monopolon pri sigeloj. Tiuj havis duoblan funkcion: ili garantiis la kvaliton kaj pruvis, ke la devigaj taksoj estis pagitaj. Poste ili iĝis privataj markoj de fakaj prilaborantoj, kiel feltlaboristoj kaj farbistoj kaj fine de la 18a kaj komence de la 19a jarcentoj ili estis nur devenomarkoj

de komercistoj kaj fabrikantoj. En aliaj regionoj oni vidis pararelan evoluon, sed alitempe kaj aliritme. En Anglio, pro la industria revolucio, la valoro de tiuj markoj iĝis pli alta ol en la eŭropa kontinento.



La uzo de plumbaj sigeloj far de la registaro ege dependis de la registara strukturo kaj de la potenco de la loka aŭ centra aŭtoritatoj. Tial, je la komenco de la 17a jarcento, sigeloj en Francio multe malpli valorigis. Tial senĉese lokaj kaj privataj sigeloj estis anstataŭigataj per reĝaj sigeloj.

Pro la kreskanta potenco de la registaro rilate al la fisko, la diferenco inter la porfiska funkcio kaj tiu de la valormarko pligrandiĝis. Sigeloj de la franca “gabelle” ne informas pri la kvalito de la salo, sed pri la pagado de devigaj taksoj. Same koncernas la triangulajn, francajn sigelojn de la t.n. “ferme du tabac”. Tio ankaŭ koncernas la doganajn sigelojn en la Nederlandoj, kiuj plie atestas pri la efikeco de la renovigo de la doganaj servoj ol pri la kvalito de la varoj.




Jen la kialo de mia pledado ne priskribi la sigelojn surbaze de iliaj supozataj funkcioj, sed laŭ iliaj teknikaj rekonmarkoj, por tiel eviti miskomprenojn kaj antaŭjuĝojn pri la funkcioj de plumbaj sigeloj.

Originala, nederlandlingva teksto kaj fotoj (escepte du en la Enkonduko): **Raf Van Laere**. Multan dankon al Raf!

MEDALISTOJ

22. Mario Nelli (1878-1936)



Florenca gravuristo. Lia subskribo aperas sur multaj medaloj ekde la unua duono de 1900, rilate al subjektoj kaj temoj tre variaj. Li starigis, en la toskana ĉefurbo, la firmaon *Nelli Mario & K.*, por farado de medaloj, kaj laŭŝajne li aktivadis en la “Domo de *Benvenuto Cellini*” kiun li mem renovigis en Florenco, en strato *della Pergola 59*.

Mario Nelli naskiĝis en 1878 en *Todi*, kiel filo de Ernesto kaj Osea Gigli de Cortona. La patro estis profesoro pri itala beletro, kiu poste translokiĝis al Romo. Ernesto vizitadis anarkiajn rondojn kaj pro serio da travivaĵoj oni devigis lin forlasi Romon kaj kun la familio ekloĝi en Kairo. Mario daŭrigis sian studadon, sed oni ne scias kie li lernis la metalarton. En 1906 li estis en Florenco, jam edziĝinta kun Livia Cappelli. En tiu sama jaro li kreis la unuan societon por forĝado kaj komercado de objektoj kiel medaloj, ŝildoj, memorplaketoj kaj artaj insignoj. Post tre malmultaj jaroj li ekricevis komisionojn de diversaj ministerioj. La societa evoluo ne sukcesis kiel esperite, tial en 1911 li malfermis novan societon kun sidejo en Romo kaj laboratorio en Florenco, kie ekaktivis kiel kunlaborantoj Duilio Cambellotti, Chierici, De Albertis, De Carolis.



Mario Nelli estis en rilato kun ĉiuj siatempaj artistoj, Carlo Rivalta, Antonio Maraini kaj Ugo Ojetti, kun kiu li interŝanĝis multajn korespondaĵojn. En 1914 oni renovigis la societan aranĝon: la laboratorio restis en Florenco kaj la sidejo troviĝis en Romo. Dume Mario daŭrigis sian laboron, produktante bustojn kaj artajn medalojn. Post la milito li decidis translokiĝi kaj la societon kaj la laboratorion.



Petinte rajtigojn kaj permesojn de la florenca komunumo por adapti la lokalojn al siaj bezonoj, Mario instalas la laboratorion en strato *della Pergola N. 59*, kie estis vivinta Benvenuto Cellini, kaj kie oni dire li fandis la statuon de Perseo. Laŭ sia kutimo ankoraŭfoje Mario ŝanĝis la societan nomon. En tiuj jardekoj li dediĉis sin al du grandaj verkoj: la *Medalario pri la Granda Milito* – pro kiu li estis laŭdita i.a. de Isidoro Del Lungo (historiisto, verkisto, poeto kaj politikisto) – kaj la fandaĵo de la pordego de Baziliko Sankta Paŭlo ekster la Muregoj, laŭ projekto de Antonio Maraini.

Mario Nelli subite mortis en 1936.

Ni dankas nian *Eldan Doerfler*, kiu elitaligis la tekston por ENA.

TERMINARO

Alfabeto Listo (22)

Duobla stampo: *monero pregita dufoje per la sama stampilo, tiel ke montriĝas “ombro”.*

Fandkaveto: *necelita kava spaceto en fanditaĵo, kiel fandita monero aŭ medalo. La kaveton kaŭzas aerbobelo penetranta en la metalo dum la fandproceso.*

Ĝustigi: *malpezigi tro pezan metalan diskon kiel bazon de monero aŭ medalo per fortranĉo aŭ forfajlo de la rando.*

Inkuso: *la erare stampita, kava flanko (reverse) de iu inkusumo.*

Inkusumo: *monero kun produkteraro, tiel ke la averso kaj la reverso montras la saman monerfiguron, sed reverse, spegulobilde kaj kave.*

Investmonero: *malgraŭ propra iama aŭ aktuala monvaloro, ĝi ne estas uzata en la ĉiutaga moncirkulado. Ĝi enhavas ĉu arĝenton, ĉu oron, ĉu platinon aŭ eĉ paladion.*

Klipo: *misstampo de monero pregita en nekompletan, malplenan metaldiskon. Tio okazas, ekzemple, se disko estas parte eltranĉata el la rando de metalplato.*

Kronita: *monero kun t.n. krono, t.e. kapo (portreto sen ŝultroj), aŭ busto (portreto kun ŝultroj) aŭ blazono.*

Laŭrkronita: *monero kun kapo aŭ busto kun glorkrono, kiel simbolo de iu venko.*

Legendo: *en la numismatiko la tekstoj ĉirkaŭ la eksteraj flankoj de averso aŭ reverso.*

Ligaturo: *la kunĉeniĝo de literoj sur numismatikaĵoj, celante plibonigi la legeblecon. Ĉefe trovebla sur romiaj kaj mezepokaj moneroj.*

Monretuŝo: *provo por revivigi eluzitan parton de monero, ekzemple per regravurado de detalo(j).*

Paladio: *kemia element kun simbolo Pd kaj atomnumero 46. Ĝi estas arĝentblanka, t.e. transiĝa metalo el la d-bloko de la tabelo de Mendelevo.*

Sieĝmonero: *helpomono emisiata en urbo dum sieĝado, ofte farita per neplenvalora materialo.*

Ŝraŭbpremita monero: *monero farita per ŝraŭbpremilo (inventita en la 16a jarcento).*

Stampilgravuristo: *artista, kiu gravuras la stampilon de monero aŭ medalo.*

Trunkotranĉo: *la suba parto de monerfigura kapo sur monero aŭ medalo, do tie kie finiĝas la kolo. Preferata loko por la nomo de la stampilgravuristo.*

NUMISMATIKA FORUMO

Konserviteco de moneroj

Albin Pogaĉnik

Esenca distingilo de malnovaj moneroj estas ilia ju pli senriproĉa konserviteco, tamen tion multaj kolektantoj malĝuste konceptas. Oni devas ridi, kiam komencantoj fieras pri “pregnovaj” kaj “fleur de coin”- ekzempleroj, dume ĉion alian rifuzas kvazaŭ senvaloran. Ĉar tia orientiĝo ne respondas al la ĝusta celo de la kolektado; estas necese pri tiu ĉi neeltenebla kaj malutila ekstremo ion diri.

Ni scias, ke oni diferencigas ĉe moneroj tri gradojn de konserviteco: unuaklasan oni signas per T^1 , duaklasan per T^2 kaj triaklasan per T^3 . Per T^2 ni signas pecojn, kiuj prezentiĝas tutaj kaj legeblaj, nek admirindaj nek havantaj ion, kio ĝenus. Do, ili estas “bonaj”. Unuaklasaj estas de tiuj pli belaj ol tiuj, triaklasaj estas malpli bonaj ol la duaklasaj, tamen ne neuzeblaj pecoj.

Tiu normala trigrada diferencigo estas plivastigebla supren per “bela” aŭ “eksterordinare bela”, malsupren per “malbona”. Tiel ni havas kvin gradojn, kio estas – konsiderante la signadon en eksterlandaj katalogoj – tro malmulta. Tio estas komprenebla, ĉar ofte vidiĝas monero, bone konservita, kun bela prego, perfekta stilo, kiel raraĵo kaj estus domaĝe tion pretervidi ĉe la priskribo de la eksterordinara peco.

Numismatiko ne celas admiri belecon, ĝi havas pli gravan signifon ol nur plezuran, ĉar ĝia esenco estas intereso por historio. Precipe la malnova mono antaŭ ĉio estis uzata objekto, kies arta aspekto kutime estas hazarda, dume arto ĉiam estas klopodo al beleco.

Ekzistas pecoj de malnovaj moneroj estiĝintaj ekskluzive kun artpretendo, tamen ne povas pravi tiuj, kiuj preferas konservitecon, ĉar en ilia admirado de la arto mankas vera sento de la amatoro, kiu estimas ankaŭ etan fragmenton “terra sigillata” aŭ torson. Artĝuo de tiuj estas pli altgrada kaj kulminas en rekonstruiga kapablo de fantazio; kontraŭe, la numismatoj strebantaj al pregnovaj pecoj, estas sklavoj de sia pedanteco.

Ni devas al ni supozi, ke numismatikaj objektoj estas disĵetitaj folioj de multvalora manuskripto, kiun kolekti estas la tasko de numismatiko. Tendencon de perfekteco ne malfortigas la fakto, ke ni estis devigataj envicigi grandnombre ankaŭ tute kutimajn, daŭre cirkulintajn pecojn aŭ tiajn, kiuj ne prezentas al niaj okuloj samtempe ankaŭ estetikon. La numismatoj, ŝatantaj ordon, estimas ankaŭ malbonajn pecojn ĝis ili tiujn povas anstataŭigi per pli belaj. Eluzita aŭ malbone pregita monero ankoraŭ ne ĝenas bonan impreson de bele ordigita kolekto. Ĝustan enhavon entenas kolekto, kiu per ĉiugradaj konservitecoj montras tiun pli malpli sukcesan lukton, kiun la malnova mono devis fari.

Se eble, ni elektas pli belajn pecojn, sed mi ne povas pledi por ekskluziva kolektado de nur pregnovaj aŭ escepte bone konservitaj moneroj. Mi ŝatas vidi, ke malnova mono ankaŭ aspektas malnova, kaj ke en kolekto estas tia, kiu montras signon de longdaŭra cirkulado, kiu

malkovras al mi terurajn tempojn. Ankaŭ el vidpunkto arta ne ĉiam estas plej bela iu pregnova antikva monero. Kontraŭe, ofte ĝuste tipa eluzeco faras ĝin artaĵo, kaŝas krudan akrecon de portretaj trajtoj kaj mildigas la masivecon de reliefo. Spertoj kun bronzaĵ moneroj jam ofte montris, ke malpura surfaco ĝis certa grado havas eĉ avantaĝon; eta rusto estiĝinta, aŭ terrestaĵoj de trovloko donas kelkfoje belegan fundamentan tonon. Ni devas permesi, ke antikvaĵoj malfermite montru sian aĝon, ĉar la kolekto de pregnovaj moneroj similas al kunveno de maljunuloj en maskoj.

Eksterordinara konserviteco estas al veraj antikvaĵoj honoro, kiun preferi kaŭzas negocado, kiu ne havas ne tiom intencon kolektadi, sed devas sekvi al certa enmonigo.

Fonto: la artikolo aperis en "Numismatika heroldo", n-ro 3/1960, organo de numismatikista societo de Slovenio. Esperantigis D. M. (kelkaj eraroj estis korektitaj). *Ilustraĵoj de la ENA-redakcio.*




Eĉ sufiĉe bone konservita fragmento de trovata kompleto, havas grandan tute alian historion ol iu hazarde



antikva greka, olimpia kruĉo, rare valoron. Tia fragmento krome rakontas elfosita kompleta artefakto.

Ĉu vi jam akiris medalon de Zamenhof?



Se ne, do rapidu ĝin mendi ĉe Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Świat 27, Pollando.

Arĝenta medalo kun skatolo kostas 6 \$, sen skatolo — 5 \$, bronza medalo kun skatolo kostas 5 \$, sen skatolo — 4 \$.

La perantoj, kiuj mendas minimume 10 pecojn ricevas 20%^o-an rabaton.

El "Pola Esperantisto" nov/dec 1959.

Prof. d-ro IVO LAPENNA

UNU FOJON EN CENT JAROJ Unu milionon de la jara enspezo!

La preparlaboroj por la grandaj festoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo, de D-ro L. L. Zamenhof bone progresas laŭ la provizora plano, publikigita en la januara numero de la revuo „Esperanto”. Estas jam formita **Internacia Organiza Komitato (IOK)**, en kiun eniris elstaraj kaj konataj esperantistoj de diversaj landoj.

Post la publikigo de la provizora plano alvenis ankaŭ tre granda nombra da pliaj proponoj, sugestoj, konsiloj. Ilia nombro estas tiel granda, ke estas maleble respondi al ĉiu unuope. La proponoj estas atente studataj kaj tute certe ĉio utila kaj realigebla estos efektiviĝita.

En ligo kun tiu inundo de proponoj kaj sugestoj estas utile atentigi, ke ne sufiĉas nur fari proponon, sed necesas ankaŭ indiki, kiu plenumos ĝin kaj per kiuj rimedoj, precipe kiam temas pri „grandiozaj” proponoj, kies realigo kostus milojn da pundoj!

Malpli abunde ol la proponoj kaj sugestoj — multe malpli — alvenis kontribuoj por la **Fondaĵo-Zamenhof**. Kelkaj sindonaj esperantistoj — ĉefe tiuj, kiuj kutime kontribuas por ĉiu utila kampanjo — jam sendis sian financon helpon. Dank' al ili kolektiĝis ĝis nun la sumo de 1.612,01 nederlandaj guldenoj. Espereble, en la momento, kiam tiuj ĉi linioj estos legataj, la Fondaĵo estos konsiderinde pli granda. Tamen, de

la kontribuoj alvenados ankaŭ en la estonteco same malrapide, kiel ĝis nun, malmulto el la provizora plano estos realigebla, eĉ por ne paroli pri la novaj proponoj, alvenintaj de diversaj flankoj. Kvankam novaj ideoj estas tre bonvenaj, tamen da ideoj ni navas sufiĉe, sed da financaj rimedoj tro malmulte! Sekve, en la nuna momento estas necese unuavice krei imponan Fondaĵon-Zamenhof.

Ciu esperantisto en la mondo, eĉ tiu kun la plej modestaj enspezoj, devus kontribui almenaŭ ion al la Fondaĵo-Zamenhof, kiu prezentas la materialan bazon de la festoj. Ne estas necesaj grandaj sumoj — kvankam la pli bonstataj esperantistoj certe povos fari pli grandan oferon — **sed estas necese, ke absolute ĉiuj kontribuu por tiu celo.** La vorto „imposto” estas iom malsimpatia en ĉiuj landoj. Eble la vortoj „libervola imposto” sonas pli alloga. Ĉu ĉiu esperantisto kaj esperantistino ne povus **unu fojon en cent jaroj oferi unu milionon (ne milionon sed milionon) de sia jara enspezo kiel sian kontribuon, minimuman, al la Fondaĵo-Zamenhof?** Mi estas certa, ke ne ekzistas tiel malriĉa persono, kiu ne povus fari tiun oferon. Se la leganto aŭ legantino konsentas, li aŭ ŝi agu jene:

1. Tuj mem kontribuu unu milionon de sia jara enspezo al la Fondaĵo-Zamenhof;

2. Informu la lokan grupon kaj siajn geamikojn pri la Jubilea Jaro



Unu el la memoraj esperantaj medaloj.

kaj tuj kolektu donacojn por la Fondaĵo-Zamenhof laŭ la prezentita principo:

3. La kolektitajn sumojn oni bonvolu sendi aŭ rekte al la **Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C.**, aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de U.E.A. en diversaj landoj kun klara mencio „Por la Fondaĵo-Zamenhof”.*

La nomoj de ĉiuj kontribuintoj aperos en la revuo. La utiligo de la Fondaĵo-Zamenhof estos farita laŭ la decidoj de la IOK. Ĉiuj elspezoj kaj enspezoj estos kontrolitaj laŭ la Statuto de U.E.A.

Ne atendu la morgaŭan tagon, sed ekagu tuj. Ne transjetu la laboron sur la aliajn, sed faru mem vian eblon. Konsciu, ke vi ne estas izolita, sed ke multaj samcelanoj agas sammaniere en la tuta mondo. Helpu jam nun, ke la festoj en la Jubilea Jaro estu vere imponaj kaj dignaj de la grandeco de la verko de D-ro Zamenhof!

D-ro Ivo Lapenna

Provizora sekretario de la IOK

*) En Pollando kolektitan monon sendu al la Cefa Estraro de AEP — PKO Warszawa I-9-120072.

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

07.04.2020 11:26

Kara Jozefo,

Unuavice mi volas demandi pri la sanstato de vi kaj via familio. Ĉu ĉiuj fartas bone?

Ĉar mi nun havas nenion farendan krom ĝardeni kaj prepari la ENA-revuon, mi povas iom pli frue sendi al vi la definitivan tekston.

Do ne urĝas la resendo, tiel ke vi povos trankvile tralegi ĝin. Mi jam tutkore dankas vin pro via nemalhavebla kunlaboro.

Amike kaj numismate,

Bert

10.04.2020 18:53

Kara Bert,

mi kunsendas la novan numeron de Esperanta Numismatiko kun miaj sugestoj de plibonigo.

Krome permesu al mi rimarkigon, nu ne gravan, tamen utilan por la unueca aspekto de nia revuo. La Monato-konvencioj konsilas logikan interpunkciadon. Estus bone, se ni sekvus tiun jaman tradicion en la konfuza ĝangalo de la Esperanta ortografio.

Por la Paskaj Festoj mi deziras al vi kaj viaj gekaruloj agrablajn tagojn, kaj antaŭ ĉio fortikan sanon!

Amike: Jozefo



09.03.2020 12:31

Estimata S-ro Trifoncovski

En LF n-ro 245 de junio 2010 vi publikigis mian monografion pri letero de Zamenhof el 1909.

Okaze de aktuala aŭkcio reaperis sufiĉe grava letero de Zamenhofs al Federico Villarreal (Lima) sur poŝtkarto el 1902. Mi planas kompili plejeble kompletajn informojn dum la venontaj monatoj kaj sekve verki samspecan monografion. Ĉu vi kaj viaj kunredaktoroj povus konsideri publicadon de tiu sufiĉe ampleksa artikolo?

Alia demando jen. Laŭdire en 2020 aperus jubilea arĝenta medalo de nia civito... Ĉu vi eventuale jam povus havigi al mi bildon kaj ceterajn informojn pri ĝi? Mi intencas anonci, se eble, la eventualan eldonon en la aprila numero de "Esperanta Numismatiko".

Mi anticipu dankas vin pro via respondo.

Samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko" (Fakdelegito pri numismatiko)

11.03.2020 22:15

Kara samideano,

Bedaŭrinde civitano Trifonchovski mortis 25 12 2013.

La nuna redakcio de LF principe bonvenigas vian artikolon, bv. sendi ĝin kiam ĝi pretos. Gratulon pro la nova malkovro!

La aperigo de la civita medalo estas prokrastita ĉar la antaŭa desegnisto kaj produktinto ne plu laboras tiukampe. Ni serĉis/as novan eblecon, ĉu vi havus sugeston?

Kore,

P. Martinelli, ĉefredaktoro

15.03.2020 17:56

Kara S-ino Martinelli

Dankon pro via respondo. Mi pardonpetas pro la prokrasto de la mia.

Mi tre bedaŭras la forpason de civitano Trifonchovski, kun kiu mi iam korespondis pri mia unua monografio por LF.

Koncerne la anoncitan jubilean medalon de la Civito, mi volonte kunlaboros, kiel mi jam faris por la UK-medalo de Seulo, la memormedalo pri De Saussure far Walter Klag kaj pli aktuale la UK-medalo de la UK en Montrealo en 2020. Tial mi kunsendos liston kun konsiloj, kiu estas sendata al helpopetantoj.

Mi supozas, ke vi nuntempe havas problemon trovi desegniston en via regiono. Se necese, mi povus kontakti en Belgio renoman artiston-medaliston, nome Paul Huybrechts, kiu i.a. kreis esperantajn memormedalojn por la iama grupo kies prezidanto mi estis dum 25 jaroj.

Problemo povus esti, ke li ne estas esperantisto, nur mastras la francan kaj la anglan. Gravas tamen, ke vi rekte kontaktu lin por intertrakti pri aspekto, eldonkvanto, mezuroj, pezo, prezo kaj sendokostoj. Se vi akceptus min kiel peranton, mi povus unuavice demandi al li en kiu lingvo li volas interparoli kun vi por trovi akordon, sekve havigi al vi lian retadreson.

PS. Multan dankon, ke vi bonvenigos por LF mian verkendan monografion pri la "Lima-letero" de Zamenhof!

Altestime kaj numismate,

Bert

15.03.2020 18:07

Kara civitano,

Dankon pro la detala respondo. Mi reskribos post deko da tagoj, ĉar nun mi estas forvojaĝonta al la Parlamenta sesio en Budapeŝto, kaj mi bezonas antaŭe viziti oficejojn por havi la permeson flugi: abrupte ĉio estas blokita en Hispanio, kvankam ĉi tie estas absolute neniu kazo de Kronviruso. Nu, la burokratio. Ĉiel, mi povas jam diri ke ne estos lingva problemo pro eventuala interŝanĝo kun s-ro Huybrechts: mi preferas la francan sed eblas ankaŭ la angla.

Amike,

Perla

05.04.2020 19:05

Kara samideanino,

Supozante, ke vi estas denove hejme kaj en bona sano, mi sendas aldone al vi skanon de aktuala medalo de Paul Huybrechts, eventuala belga kandidato-medalisto por la nova medalo de la Civito.

Ĉu mi kontaktu lin por vi?

Amike kaj numismate,

Bert

05.04.2020 19:26

Kara civitano,

Dankon pro via atento: jes mi estas nun en Chaundefono, sana kaj sufiĉe trankvila, sed en preskaŭ sieĝa etoso: ĉio fermita, krom la bazaj servoj.
La anoncitan skanaĵon mi ne ricevis :-)... Bv. sendi ĝin rekte al Pro Esperanto, kiu ekde nun okupiĝos pri la temo kaj do kontaktos vin post la ricevo. Retadreso supre.

Kun amikaj bondeziroj,

Perla

08.04.2020 9:14

Kara civitano,

Koran dankon pro via afabla interesiĝo. Rilate al la arĝenta speso honore al la 50-jariĝo de LF, la ĉefa demando ne estas la desegnisto, sed estas la pregejo. Kion vi konsilas?

Amike kaj civitane

,
Giorgio Silfer, prokuristo
PRO ESPERANTO

08.04.2020 18:23

Kara samideano,

La artisto-medalista Paul Huybrechts profesie kunlaboras kun ateliero en Belgio kie liaj propraj kreaĵoj estas farataj, kiel estis la medalo kies bildojn mi ekzemplocele kunsendis. Li do desegnas, skizas kaj farigas.

Amike kaj numismate,

Bert



08.04.2020 11:20

Kara Bert!

Hieraŭ mi transportis hejmen la 50 Stelojn.

Mi kunsendas:

- Desegnaĵon de averso (nominal-flanko) kaj reverso (portret-flanko), kune, fare de mag. Helmut Andexlinger – monogramo A. H.;
- Skanon de la averso (“rundsw“);
- Skanon de la reverso (“rundsw“);
- Ateston (“Qualitätszertifikat”).

Jen mallonga priskribo:

2020 estas la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker kunorganizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pravas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi nian lingvon. Julia kunfondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj kuneldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.



Nun mi devas finkalkuli la prezon post la ricevo de la fakturo. Verŝajne ĝi estas 60 € + sendokostoj (en Eŭrolandoj 10 € por unu paketo, sendepende de la nombro de la medaloj). Krome aperos broŝuro pri Julia. La provizora eldono estas jam preta.

Elkoran saluton!

Walter

08.04.2020 18:31

Mia kara amiko!

Korajn gratulojn pro la projekto kaj la rezulto! Kaj la bildoj kaj la informoj estas perfekta bazo por priskribi tiun novan perlon en la 3a numero de jarkolekto 7, do fine de julio. Ĉu via kontonumero estas ankoraŭ la sama? Mi atendas la finkalkulon de la definitiva prezo!

Amike kaj numismate,

Bert



13.04.2020 23:20

Karaj -

Mi tre dankas vin pro via mendo por la medalo, kiun ni planis presi por memorigi la 105-an Universalan Kongreson en Montrealo ĉijare.

Kiel vi certe jam aŭdis, UEA lastatempe decidis, pro la kronviroza pandemio, nuligi la ĉijaran UK-on (kaj anstataŭigi ĝin per virtuala kongreso). Ili ankaŭ anoncis ke la UK en 2022 ja okazos en Montrealo:

<https://uea.org/aktuale/komuniko/2020/La-Universala-Kongreso-en-Montrealo-prokrastita-al-la-jaro-2022>

Tial, la laboro de la Montreala LKK ne estos tute malŝparata, ĉar nia planita programo plejparte plu validos post du jaroj.

Feliĉe, ni ankoraŭ ne presigis la medalon. Ni certe intencas produkti ĝin en 2022, kaj esperas ke tiam vi ankoraŭ volos aĉeti ekzempleron.

Mi do denove kontaktos vin je la komenco de la jaro 2022.

Mi esperas ke vi kaj viaj familianoj bone fartas dum tiu ĉi malfacila tempo, kaj ke ni povos rekontiĝi en Montrealo post du jaroj.

Amike salutas vin,

Garry

Kasisto, LKK por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto

14.04.2020 10:06

Kara Gerry,

Mi bonorde ricevis vian ĝeneralan mesaĝon koncerne la UK-n 2022an en Montrealo.

Kompreneble estas domaĝe, sed kiel vi prave diras, plej grava estas la sano de la partoprenontoj.

Pozitiva konstato estas, ke la preparoj ne estos vanaj, kvankam certe kelkaj eventoj kaj programeroj devos esti aktualigotaj aŭ reorganizotaj.

Mi supozas, ke la glumarkoj kun jarindiko 2021 ne plu taŭgus, sed ili iĝos verŝajne raraĵo. Ĉu la LKK jam konsideris fari novajn? Kiel numismato kaj subtenanto de via medala projekto, mi ĝojas, ke ĝi ne jam estas pregita. Tiel la dato senprobleme povas esti ŝanĝota.

Nuntempe mi daŭrigas kolekti retadresojn de esperantaj periodaĵoj kaj pro la krizo mi havos pli da tempo por serĉi kaj por poste dissendi la anoncon pri la medalo. Se vi havus ajnajn adresojn al kiuj anonco estus sendenda, bonvolu transsendi ilin al mi.

Mi mem jam povas konfirmi mian mendon por kvar ekzempleroj. Tiu medalo estos mejlŝtono en la historio de esperantaj numismatikaĵoj en Kanado kaj en Esperantujo. Mi do pacience atendas viajn informojn koncerne la pagendan sumon kaj la numeron de la bankokonto.

Ĝis hodiaŭ, kara Gerry, miaj gekaruloj kaj ni mem estas en bona sanstato kaj mi deziras kaj esperas ke tio ankaŭ estas la situacio por viaj familio kaj geparencoj.

Mi tutkore salutas vin kaj la aliajn samideanojn en Montrealo kaj en Kanado.

Amike kaj numismate,

Bert Boon



15.04.2020 13:01

dankon pro via bela revuo, kiun mi ĉiam foliumas kun plezuro.

amike

Renato Corsetti



16.04.2020 9:28

Kara Bert!

Tre mi ĝuis ĉiun vorton de la freŝa artikolo pri, mi diru, nia propra mono/monsisistemo!

Vilĉjo Harmon, estis tre ŝatata, amata de mi.

Pri la nuna skribanto: mi kolektas *fantaziajn esperantajn monerojn*.

Ne surprizos vin, ke mi ja havas ĉiujn stelo-monerojn.

Mi jam vidis en numismata katalogo, ke ekzistas 25 steloj el kupro-nikelo. Kvankam tio ĉi ja interesas min, mi mem dubas, ke tio ĉi ekzistas.

Aldonas mi, ke mi amas tiun, mian spesmilon! Dezirata de mi, diras mi al vi, estas la spesmilo- monero. Ho ve!

Vin salutas tutkore

Keneĉjo Goldbergo.

P.S. Mi povas supozi, ke Heidi Goes estas la *Heidi*, kiu tiel bele korespondadis kun vi. Heidi estas kara amikino mia ☐

17.04.2020 10:58

Kara Keneĉjo!

Unue multan dankon pro via reago. Mi estas kontenta, ke la revuo plaĉas al vi.

Via kolekta temo pri fantaziaj esperantaj moneroj estas interesa aspekto de numismatiko. Eble vi havas specimenojn kiujn mi ne jam konas, ĉu? Ĉu vi povus sendi liston?

Mi gratulas vin, ĉar vi havas la plimulton de la stelo-moneroj. La kupro-nikela 25-stelo-monero vere ekzistas. La eldonkvanto estas nur 1000 ekzempleroj, do ĝi estas rara. Ĉu vi scias, ke ankaŭ estis pregitaj 10 ekzempleroj en oro?

Se mi bone komprenas, en via kolekto ankaŭ estas spesmilo-monero? Ĉu vi povus sendi al mi skanojn de ambaŭ flankoj?

Jam pli ol 30 jarojn mi vane serĉas 2spesmilo-moneron, do sen sukceso!

Sinjoron Harmon mi bedaŭrinde ne persone konis, sed Heidi Goes jam de 1987.

Aldone mi montras, kiel vi povas trovi artikolojn pri spesmilo- kaj stelo-moneroj. Vi rajtas legi kaj eĉ elŝuti la numerojn kiujn vi volas:

...iru al Google kaj tajpu:

<http://ena.frali.bplaced.net>

Vi ricevas:

Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Iru suben ĝis la tabelo kun ĉiuj aperintaj numeroj. Klaku sur la numerojn:

EN 2015 n-ro 1 (spesmilo)

EN 2016 n-ro 2 (steloj 1,5,10)

EN 2016 n-ro 3 (stelo 25)

Amike kaj numismate,

Bert



A N O N C O J

&

E V E N T O J



Tutmonda Esperanta Ĉifroakademio

Saluton, esperantistoj, mi decidis krei ĉi paĝon en mia persona retejo por ke ĝi servos kiel bonvenigilo kaj baza instruilo por novaj partoprenantoj de projekto **TEĈ**, *Tutmonda Esperanta Ĉifroakademio*.

Eble multaj el vi jam konas pri jena projekto starigata de s-ano Matthias Liszt kaj mi. Unuafoje ĝi estis nomata *Tutmonda Esperanta Kriptoakademio (TEK)*; tamen, se vi esploras pri la radikoj kunformantaj tiun lastan vorton (*Kriptoakademio*) vi ekscios ke *kripto* ja estas “subtera tombejo”.

Ni tute pretervidis tion kaj fuŝis la vortan kunmetaĵon, do ni devis reformi la nomon. Mi ne ŝatus ke iuj supozos ke nia *Akademio* temas pri spertaj eo-tombistoj... La radiko kiun ni bezonis estis “ĉifro”, ĉar nia afero temas pri tiaj teĥnologiaj metodoj kaj ties grandaj eblecoj.

Do ĝi estas nun *Tutmonda Esperanta Ĉifroakademio (TEĈ)*, ideo kiu ŝprucis el inspiro de Matthias (esperantisto kaj programisto de la [projekto WeKu](#)) por allogi la esperantistaron en mondon de ĉifrovaluta ekonomio, kiu estas, laŭ mia plej klara vido, grava parto de la homa estonteco.



Mi certas ke ni miskonstruos aliajn vortojn ĉar tiu temo estas tro nova, kaj ne ekzistas ankoraŭ vortoj en la Esperanta aŭ aliaj lingvoj por priskribi tiujn detalojn teĥnologiajn. Tamen ni penos konstrui pli prave la bezonotan fakvortaron... tio estas unu el niaj taskoj (iam baldaŭ ni komencos verkadon en Vikipedio tiucele). Pluse, ni petas la helpon de aliaj esperanto-parolantoj por tia interesa konstruado.

Legu pli: <https://spirajn.com/tutmonda-esperanta-cxifroakademio/>

Ni dankas nian membron Herman Deceuninck por havigi la tekston al ni.

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 141 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”